

pola

sendependa revuo  
de polaj esperantistoj

# esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 2/2005 ★ ISSN 0032-2431

# 21:37

„LIAJ OKULOJ ESTIS PLENAJ DE  
LUMO, LI RIDETIS...”

Arturo Mari  
fotisto kaj amiko de la Papo Johano Paŭlo la 2a

2  

---

2005

## Enhavtabelo:

3	Ne timu... ĝoju! <i>Kazimierz Leja</i>
4	Johano Paŭlo la 2a kaj Esperanto <i>IKUE</i>
8	Mesaĝo de la Papo por la Pasko 2005 <i>IKUE</i>
9	Omaĝe al Janusz Korczak <i>Tatjana Cvejn</i>
12	Tyburcjusz Tyblewski — la fama „Tiburĉjo” <i>Stanisław Śmigieński</i>
14	Malborkano 2004 <i>Roman Dobrzyński</i>
16	Sieĝoj de Malborko <i>Roman Dobrzyński</i>
20	Novajservo de la Pola Sekcio de ILEI <i>Maria Majerczak</i>
21	UEA tiras atenton de UN-Komisiono al lingvaj homaj rajtoj <i>Gazetaraj Komunikoj de UEA</i>
22	Esperantistoj en Eŭropa Parlamento <i>Andreo Marszałkowski</i>
24	EUROSCOLA — ŝanco por disvastigi instruadon de Esperanto <i>Magdalena Tatara</i>
26	Estas interkomprenigilo! <i>Andrzej Szczudło, Andrzej Kiszkiel</i>
28	„Verdaj Arbetoj” lernas Esperanton <i>Teresa Konsek</i>
29	Internacia Junulara Kongreso — Zakopane <i>Anna Bichta</i>

## Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.  
N-ro 2/2005 – ISSN 0032–2431  
eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

**Redaktoro:** Kazimierz LEJA

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro.

**TTT-paĝo:** [www.hejme.e-tools.pl](http://www.hejme.e-tools.pl)

**Retpoŝto:** [kleja@hejme.e-tools.pl](mailto:kleja@hejme.e-tools.pl)

**Tel.:** (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

*La redaktoro rezervas al si rajton mallongigi kaj redakti la tekstojn.*

**Jarabono enlanda:** 30,00 PLN pagenda al:  
Wydawnictwo Hejme, PL 41–250 Czeladź,  
str. Wąska 21, skrytka 59  
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

**Jarabono eksterlanda:** 12,00 EUR pagenda al:  
UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto:  
<leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6  
EUR. Nepre informu eldonejon pri via pago!

# Ne timu... ĝoju!

*La* mondo haltis en sia kutima ritmo la 2an de aprilo, kiam en Vatikano forpasis la Papo Johano Paŭlo la 2a. Tristo, larmoj kaj medito ekposedis tiujn, kiuj Lin amis kaj respektis. La tuta mondo — religia, politika — omaĝas sian Grandan Patron je nekutima skalo: en multaj landoj oni proklamis funebrajn tagojn, TV kaj gazetaro informas senĉese pri rilatantaj temoj okazintaĵoj kaj okazontaĵoj. Miloj da homoj kolektiĝas por komune preĝi, en librovendejoj malaperas libroj de Karol Wojtyła, pli ol 4 milionoj da pilgrimantoj estas atendataj en Vatikano vendrede, kiam okazos la funebra ceremonio, kaj entombigo de la Papo.

Ĉiuj nomas la Papon „La Granda” kaj parolas pri Lia baldaŭa beatigo.

Dum granda pola diskuto, okazanta i. a. en TV ofte oni demandas: kion ni, poloj, plejparte katolikoj, fieraj pro „nia papo”, kion ni prenis por sia vivo el Lia instruado kaj Lia vivo-ekzemplo — dum Li ankoraŭ vivis inter ni? Kion ni faras por ne disipi Lian instruon, Lian saĝon, kaj nekompareblan amon al ĉiu simpla homo,

ofte kredanta alie, ofte pensanta alie ol ni? Kion ni faru, por ke Lia spirita heredaĵo ne fariĝu en nia vivo nur belsonaj vortoj, ripetataj papage?

La Papo senĉese parolis pri dialogo, solidareco kaj estimo al proksimumo. Neniam kompromisante, estis Viva Ekzemplo de ĉio, pri kio Li parolis aŭ skribis. En ĉio-ĉi estis nek socialisto nek kapitalisto. Estis kaj restos por ĉiam — simple — VERA HOMO, amanta sian Dion.

Adiaŭante la Papon en Lia lasta vojo ni provu esti, kia Li estis: sencera, simplaj, veraj, amantaj proksimumon kaj la pacon.

En ĉi-numero de PE ni publikigas artikolon de IKUE pri la Papo kaj Esperanto. En sekvaj numeroj ĉi-jaraj aperos ankaŭ aliaj materialoj kaj tradukoj de Liaj verkoj.

Al ĉiuj legantoj, kiuj sendis Paskajn bondezirojn mi kore dankas kaj reciprokas ilin:

*Jesuo Kristo krucumita kaj resurektinta, kiu ĉiam restas la unusola Vojo al Dio kaj repaciĝo, estu por ni ĉiuj ekzemplo de nia konduto*

**Kazimierz Leja**  
**2005-04-05**

***Aldone al nia „fideleco je Petro”, por ni katolikaj esperantistoj ekzistas plia motivo de amemo kaj dankemo rilate al la Sankta Patro. Li elmontris — daŭrigante la longan serion da patrecaj subtenoj de liaj antaŭuloj — multe da proksimeco kaj kuraĝigo al la idealoj de la katolika E-movado, kaj tio jam antaŭ la papeco.***

## **JOHANO PAŬLO LA 2a kaj ESPERANTO**

Ĉiuj scias, ke Esperanto estas apreciata en Pollando, en kies katolika medio ĝi estas uzata de jardekoj. En tiaj cirkonstancoj ne estas mirige, ke la tiama Metropolito de Krakovo, kardinalo Wojtyła, sekvis kun simpatio la katolikan E-movadon. Tio kulminis en 1977, per la akcepto de la Alta Protektado de la 37a IKUE-kongreso, al kiu li sendis jenan mesaĝon (legeblan en la libro de tiu Kongreso): „Patro Sankta, gardu en via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu unu tiel same, kiel ni (Joh. 17, 11). Kiel Jesuo Kristo preĝis por siaj disĉiploj pri la unueco, tiel same mi en la nomo de la Eklezio preĝas viaintence. Unu kredo kaj unu amo helpu al vi unuigi la disbatitan mondon en unu ŝafaron sub unu Paŝtisto. Unu supernacia lingvo — Esperanto — ankaŭ servu efike al ĉi tiu nobla celo. En mia propra nomo kaj en la nomo de multaj favoraj al vi polaj episkopoj, mi benas vian agadon kaj deziras al vi la Dian gracon”.

Okaze de la Kongreso, la tiama kardinalo Wojtyła estus devinta ne nur ĉeesti, sed eĉ celebri la Sanktan Meson kaj prediki en Esperanto. Pa-

po Paŭlo la 6a, per telegramo kiun li sendigis de mons-ro Innocenti, rajtigis kardinalon Wojtyła celebri tiun Meson en Esperanto. Ĉio estis jam preta, kiam neatendita cirkonstanco devigis la kardinalon rezigni pri la aranĝo. Sed ni legu la vortojn, kiujn li mem tre delikate skribis (en pola lingvo) al la organiza komitato: „Bonvolu akcepti mian senkulpigon pro la foresto la 18an de aŭgusto sur la Hela Monto. Neatendite por ni ĉiuj okazis en tiu tago la enterigo de la sankte memorigata pastro arkiepiskopo Antonio Baraniak, la metropolito de Poznań. Kvankam la funkcioj konfiditaj al mi fare de la organizantoj de la Kongreso estas ege honoraj kaj gravaj kaj mi tre volus ilin plenumi, nepre necesa estas mia partopreno en la funebraj ceremonioj, ligitaj kun la sepulto de la metropolito de Poznań, tre proksima al ni ĉiuj kaj meritplena por la Eklezio en nia patrujo. Tial mi petas la Prezidiumon kaj ankaŭ ĉiujn estimindajn Kongresanojn kompreni la motivon de mia foresto kaj pardoni ĝin. La ĉefcelebranton de la Sankta Meso elektu la kongresa Prezidiumo laŭ sia bontrovo. Spirite kunligita

kun la preĝo kaj la laboroj de la Kongreso, mi esprimas la esperon, ke sub la sankta patroneco de la Helmon-ta Sinjorino, ĝi donos benatajn fruktojn”.

Alian esprimon de simpatio kardinalo Wojtyła faris malmultajn monatojn antaŭ la elekto al papado, kiam li bondeziris al EK okaze de la 75-jara datreveno de nia revuo (v. EK 8/1978, p. 132).

Tre afablajn vortojn li ankaŭ skribis, pli antaŭe, por danki por la sendo al li de kelkaj fotoj faritaj de la tiama landa reprezentanto de IKUE por Germanio, d-ro Josef Kondor.

En EK 12/1978, la tiama redaktoro d-ro De Salvo skribis: „ni varme esperas, ke Papo Wojtyła, havos por ni, katolikaj esperantistoj, la saman simpatian, kiun li montris al ni kiel kardinalo, kaj eventuale eĉ iom pli multe”. Neniu dubo, ke la espero siatempe esprimita de De Salvo konkretiĝis. Dum la papado de Johano Paŭlo la 2a la katolika E-movado travivis multajn gravajn momentojn de sia historio: agnosko de IKUE kiel asocio laŭ papa juro, aprobo de la Meslibro kaj Legafaro, enigo de Esperanto inter la lingvoj uzataj de la Papo Kristnaske kaj Paske.

**Kun Johano Paŭlo la 2a Esperanto fariĝis ne nur lingvo „aprobata”, sed ankaŭ „parolata” de la katolika Eklezio.**

La unua fojo, kiam Papo parolis en Esperanto dum publika ceremonio okazis en Ĉenstoŝovo, kadre de la monda junulara tago: la 14an de aŭgusto 1991, vespere, okazas lia

bonveniga saluto. „Mi donas ankaŭ en Esperanto bonvenan saluton al la junaj pilgrimantoj el la tuta mondo, en ĉi tiu tago de universala frateco, kiu vidas nin unuigitaj kiel filoj de unu sama Patro en la nomo de Kristo, vero de la homo!”.

La postan tagon, ferme de la celebroy, la Papo denove adresas siajn plurlingvaj salutojn al la gejunuloj en Ĉenstoŝovo. En Esperanto li diras: „Karegaj junuloj! La sperto de kredo, travivita ĉe la piedoj de la ‘Nigra Madono’ restu neforigebla gravurita en viaj koroj. Sanktega Maria akompanu Vin”. Nepras memori, ke pro la amaso da junaj ĉeestantoj, la programo de la ceremonioj prokrastiĝis, tiel ke la Papo devis tranĉi kelkajn el la plurlingvaj salutoj, sed li ne saltis la esperantlingvaj salutojn.

Ekde Pasko 1994 la Papo aldonas Esperanton al la plurlingvaj bondeziroj „Urbi et orbi” (al Romo kaj al la mondo). Ekde tiam je Pasko li diras: „Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta”; je Kristnasko: „Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron”.

En 1997 la IKUE-kongreso okazas dum la komencaj 3 tagoj en Romo, kaj la kongresanoj partoprenas en la ĝenerala aŭdienco en placo Sankta Petro de la 3a de septembro. Al ili la Papo adresis sin en Esperanto per la vortoj: „Mi ĝojas bonvenigi la responsulojn de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista engaĝitajn en sia kvindeka Kongreso. Karegaj, la temo de via renkonto reprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de

universaleco, kiu estas ĉe la bazo de la lingvo kiun vi kulturis”.

Alia papa saluto al IKUE-kongresanoj ripetigos en la jaro 2000, sed en la itala lingvo (ĝenerala aŭdienco de la 06.09.2000).

Ĉiuj ĉi personaj elmontraj de simpatio kaj atento estas verŝajne la plej karmemoraj eventoj por ni, el ĉiuj subtenoj, kiujn la Eklezio dum la historio donis al kato-  
lika E-movado kaj al Esperanto.



### ***La teksto en la latina lingvo diras:***


Plaĉas komuniki al vi, ke la Plejsupra Pontifiko bonvole allasis, okaze de la esperantista kongreso de Ĉenstohovo en la monato aŭgusto de ĉi tiu jaro, ke la Meso por la kongresanoj povu celebriĝi por ĉi tiu fojo en lingvo Esperanto, sub la respondeco de Via Eminenco.

Respektoplene Via:

Antonio Innocenti, ĉefepiskopo sekretario.

*La forpaso de la episkopo de Poznan, Baraniak, kaj la devo de kard. Wojtyła celebri la funebran riton, ne ebligis al la estonta Johano Paŭlo la 2a ĉeesti dum la Kongreso de IKUE kaj celebri la Meson en Esperanto.*

En persona, tre nobla letero en la pola, kard. Wojtyła klarigis la motivon de sia neĉeesto kaj petis indulgon de la kongresanoj.



## **La letero per kiu kard. Karol Wojtyła klarigis, kial li ne povis iri al Ĉenstoĥovo por celebri Meson en Esperanto dum la IKUE-kongreso 1977**

Krakovo, la 16an de aŭgusto 1977.

Bonvolu akcepti mian senkulpigon pro la foresto la 18an de aŭgusto sur la Hela Monto.

Neatendite por ĉiuj okazis en tiu tago la enterigo de la sankte memorigata pastro ĉefepiskopo Antonio Baraniak, la metropolito de Poznań.

Kvankam la funkcioj konfiditaj al mi fare de la organizantoj de la Kongreso estas ege honorigaj kaj gravaj kaj mi tre volus ilin plenumi,

nepre necesa estas mia partopreno en la funebraj ceremonioj, ligitaj kun la entombigo de la metropolito de Poznań, tre proksima al ni ĉiuj kaj meritplena por la Eklezio en nia patrujo.

Tial mi petas la Prezidiumon kiel ankaŭ ĉiujn estimindajn Kongresanojn kompreni la motivon de mia foresto kaj pardoni ĝin. La ĉefcelebranton de la Sankta Meso elektu la kongresa Prezidiumo laŭ sia bontrovo.

Spirite kunligita kun la preĝo kaj la laboroj de la Kongreso, mi esprimas la esperon, ke sub la sankta patroneco de la Helmonta Sinjorino, ĝi donos benatajn fruktojn.

(-) Karol kard. Wojtyła



El: jubilea numero de *Espero Katolika* en la centa datreveno de ĝia apero, kun la afabla permeso de Carlo Sarandrea. Petu senpagan ekzempleron de ĉi tiu revuo al [ikue@ikue.org](mailto:ikue@ikue.org) klare indikante vian poŝtan adreson. La sekvonta mesaĝo de la Papo estas prenita el la ttt-ejo de IKUE.

# MESAĜO DE LA PAPO POR LA PASKO 2005

Placo Sankta Petro, 2005.04.27

## 1. Mane nobiscum, Domine!

*Restu kun ni, Sinjoro!*  
(kp Luk 24,29).

Per ĉi tiuj vortoj la disĉiploj de Emaus invitis la misteran Vojiranton resti kun ili, dum vesperiĝis tiu unua tago post la sabato dum kiu la nekredblo okazis.

Laŭ la promeso, Kristo resurektis; sed ili ankoraŭ ne sciis tion.

Tamen la vortoj de la Vojiranto dum la irado laŭgrade varmigis ilian koron.

Poste, sidantaj ĉirkaŭ la tablo de la vespermanĝo, ili rekonis Lin ĉe la „dispecigo de la pano”.

Kaj tuj Li malaperis.

Fronte al ili restis la dispecigita pano, kaj en iliaj koroj la dolĉeco de tiuj Liaj vortoj.

## 2. Karegaj gefratoj,

la Parolo kaj la Pano de la Eŭkaristio, mistero kaj donaco de Pasko, restas en la jarcentoj kiel ĉiamdaŭra rememoro de la pasiono, morto kaj resurekto de Kristo!

Ankaŭ ni, hodiaŭ, Pasko de Resurekto, kun ĉiuj kristanoj de la mondo, ripetas:

Jesuo, krucumita kaj resurektinta, restu kun ni!

Restu kun ni, fidela amiko kaj se-

kura subteno de la homaro iranta laŭ la vojoj de la tempo!

Vi, vivanta Parolo de la Patro, verŝas konfidon kaj esperon en tiujn, kiu serĉas la aŭtentikan signifon de sia ekzistado.

Vi, Pano de eterna vivo, nutras la homon kiu malsatas je vero, libereco, justeco kaj paco.

## 3. Restu kun ni, vivanta Parolo de la Patro,

kaj instruu al ni vortojn kaj gestojn de paco: paco por la tero konsekrita per via sango kaj trempita de la sango de multaj senkulpaj viktimoj;

paco por la Landoj de Mezoriento kaj Afriko, kie ankaŭ multe da sango daŭre estas verŝata;

paco por la tuta homaro, super kiu ĉiam ŝvebas la danĝero de frato-murdaj militoj.

Restu kun ni, Pano de eterna vivo, dispecigita kaj disdonita al la kunmanĝantoj:

donu ankaŭ al ni la forton de malavara solidareco favore al la multaj kiuj, ankoraŭ hodiaŭ, suferas kaj mortas pro mizero kaj malsato, ekstermitaj de mortigaj epidemioj aŭ elĉerpitaj de senmezuraj naturaj katastrofoj.

Per la forto de via Resurekto ke ankaŭ ili estu partoprenantoj en nova vivo.



# Omaĝe al Janusz Korczak

Fine de la pasinta jaro aperis en Serbio-Montenegro la serba versio de la libro de Igor Newerly „Interparolo en la frukt-ĝardeno”, tradukita el Esperanto kiel ponto-lingvo (el la pola tradukis ĝin Zofia Banet-Fornalowa).

Agnesa Eremija, la tradukistino al la serba, en sia letero al Zofia skribis jene:



## 4. Ankaŭ ni, viroj kaj virinoj de la tria jarmilo,

bezonas Vin, resurektinta Sinjoro!

Restu kun ni nun kaj ĝis la fino de la tempo.

Igu, ke la materia progreso de la popoloj neniam vualu la spiritajn valorojn kiuj estas animo de ilia civilizacio.

Subtenu nin, ni Vin preĝas, dum nia irado.

Je Vi ni kredas, en Vi ni esperas, ĉar nur Vi havas vortojn de eterna vivo (kp Joh 6,68).

*Mane nobiscum, Domine! Haleluja!*

Bonan Paskon al ĉiuj.

**El Vatikano, la 27an de marto 2005,  
Pasko de la Resurekto**

„Mi povas sciigi Vin, ke la 27an de decembro 2004 okazis prezentado de la tradukaĵo en nia E-Societo. Tio estis la ideo de Jovica Aĉin, kiu longe kaj bele parolis pri Korczak, Newerly kaj pri la traduko. Krome, en februaro oni intencas fari prezentadon en la Juda Komunumo. Mi promesas raporti pri tiu okazontaĵo”.

Ĉi-monate oni celebros la 60an datrevenon de liberigo de Auschwitz-Birkenau. Korczak estis kun siaj protektitoj per nepriskribebla, senracia krueleco, gasumita en Treblinka, same kiel milionoj en s.m. fi-murdejo. Valoras substreki, ke pere de Esperanto oni semas liajn ideojn servantaj por ke neniam plu...

Sur la dorsflanka kovrilo de la libro skribas Jovica Aĉin:

„Malgraŭ mia arda deziro, tamen mi ne povas diri, ke la ĉi tie preparita homo estas ĉiutaga. Kiu tiamaniere pensas, ege malpravas. Sed tio ne subkomprenas nian vanan esperon ke tiaj homoj faros iam la plejmulton. Tio unuavice dependas de ni, de tio kiu ni estas en ni mem.

La unuan fojon mi renkontiĝis kun Janusz Korczak, al kiu tiu ĉi nutranĵo Ĝardeno estas dediĉita, dank’ al la filmo de Andrzej Wajda siatempe dediĉis al li. Tuj mi komprenis ke temas pri homo ĉiotempa. Samkiel es-

tis la instruistoj de la urbo Kragujavac, aŭ Ota, la pli juna fratino de Franc Kafka. Ili ĉiuj foriris morti kun la infanoj en koncentrejon aŭ antaŭ pafiloj, por ke la infanoj ne estu solaj, por ke ili sciu: la naskiĝo ne alportis al ili malamon, sed amon, ne forlason, sed nian nepran sindonemon. Tiel opiniis Korczak, kaj mi absolute samopiniis kun li. Leciono estas tio pri simpla sed tamen rara kaj nepre necesa humaneco, sen mensogoj kaj plensorbita de grandanimeco.

La atestado de Newerly pri Korczak estas tute senpera. Dum lia junaĝo li estis kunlaboranto de Korczak, estis vere intima kun li, kaj tiel havis eblecon ekkoni kiom homece batis lia koro. Do, tiu *Interparolo en la fruktĝardeno* estas tieldirite ŝuldo plenigita per netaskebla modesteco de verkista modulado en simpla kaj efekta lingvo per kiu li sciigas varmajn verojn pri escepta oferemo de homo, edukisto ĝis la lasta spiro, al kies elektia familio apartenas ĉiuj infanoj de la mondo. Tio estas ankaŭ mia familio.

Ankoraŭ io aldone al la verko. Temas pri du tradukistaj amoj: samkiel al tiu ĉi altvalora atestado pri Korczak fare de la elstara, bone konata pola literaturisto Igor Newerly, tiel ankaŭ al Esperanto (al kiu kaj el kiu la libro estis tradukita), lingvo kreita por esti internacia medio de komunikado inter la homoj, kaj kiu eĉ hodiaŭ persistas per nereduktita forto kiel garantiĝo de pasio kaj espero. Ĉifoje tiu garantiĝo trovas belegan lokon en la spirito de Agnesa Eremija.

## **Pri la tradukintino**

Agnesa Eremija naskiĝis la 26an de januaro 1919 en Oradea (Rumanio).

„Plenkreskis mi en Novi Sad (Jugoslavio) kie mi en 1937 faris maturekzamenon, kaj en 1939 finis kurson de stenodaktilografio kaj korespondado en kvar lingvoj (serba, hungara, germana kaj franca). De 1945 ĝis 1949 mi laboris kiel tradukisto en la t presagentejo TANJUG kaj en la senditejo de nia lando en Budapeŝto. De 1949 ĝis 1954 mi estas tradukisto kaj parolisto por la hungara lingvo ĉe Radio Beograd. Intertempe mi studadis la francan kaj germanan lingvojn en la Filozofia Fakultato de Beogrado kaj faris diplomekzamenon en 1954. Ekde tiam mi laboris kiel mezlerneja profesoro de ambaŭ lingvoj. En 1974 mi ricevis Ordenon de laboro, kaj pro mia aktiveco en la Societo por fremdaj lingvoj kaj literaturo oni donis al mi plurfoje dankleterojn.

Post mia emeritiĝo mi ekinteresiĝis pri la internacia lingvo Esperanto, kaj farinte ekzamenojn A kaj B, mi komencis traduki al Esperanto mallongajn verkojn kaj fragmentojn el la verkoj de Ivo Andrić, Danilo Kiš, Bora Stanković kaj aliaj. Tiuj tradukoj estis aperigitaj en la E-gazetaro de nia lando. En aparta broŝuro estis presita mia traduko de plej konataj popolaj poezioj el la Kosova ciklo. Mi partoprenis en du E-literaturaj konkursoj. En la jaro 1989 mi gajnis en Subotica la trian premion por la traduko de la fragmento „Knabo kaj hundo” el la verko „Fruaj ĉagrenoj” de Danilo Kiš, kaj en 2001 dum la konkurso

en la urbo Niš la unuan premion por la traduko de la rakonto „Gloro estas morti por la patrujo” el la „Enciklopedio de mortintoj” de Danilo Kiš”.

Agnesa Eremija tradukis el la germana lingvo al la serba kelkajn ĉe ni ne sufiĉe konatajn verkojn de Heinrich Heine, traktantaj judajn temojn. La libro aperis dank’ al financa subteno de la fonduso „Buki Finci” ĉe la Ligo de judaj komunumoj de Serbio kaj Montenegro, sub la titolo „Legendo pri la rabeno de Baharah” (2004).

„Mia vivo en la infero de Holokaŭsto estis kunigo de timo, espero kaj spirito” – rakontas Agnesa. „Ni instruitis esti kuraĝaj kaj pretaj je ĉiuj mizeroj; kaj la mizeroj surŝutis min kiel lavinoj. Ĉion en kio konsistis la beleco de mia junaĝo mallumigis Holokaŭsto. Ĉiuj miaj plej karaj pereis, travivis nur mia patro kaj mi, sed bedaŭrinde li mortis nelonge post la liberigo...”

La konatiĝo kun ĉi tiu modesta, bonintenca, diligenta virino, tolema en ĉiuj cirkonstancoj, preta je ĉiuspeca kunlaboro en ĉi tiu perturba tempo kun malordigita taksado de ĉio ajn, riĉigos nian legantaron pere de „Interparolo en la fruktĝardeno” de Igor Newerly, pri kiu Zofia Banet-Fornalowa diris sufiĉe en ĉi tiu libro. En sia letero adresita al Agnesa Eremija ŝi sciigas, ke ŝi tutkore konsentas ke oni traduku la „Interparolon” el ŝia Esperanto-traduko, kaj ke ŝi konstante multe laboras por disvastiĝi la edukajn konceptojn de Korczak. „Oni ne povas ilin trakti sen kompreno, ke li entute estis granda pensulo

kaj liaj ideoj pri edukado estas parto de lia granda idealisma, humanisma strebado ŝanĝi la mondon je pli bona, harmonia, homeca. Mi, aktivante, konvinkigis, ke Korczak estas daŭre bezonata tra la mondo. Mi prelegis pri lia ideo kaj ties apliko en pluraj eŭropaj landoj, ankaŭ en Argentino, Brazilo, Sovetio, Japanio, skandinavaj landoj. Landoj, mondpartoj kun diversaj pasinto kaj kulturo, religio, ekonomia statuso, kaj ĉie oni montris grandan intereson pri li kaj lia konceptaro. La Korczak-asocioj alte aprezas mian aktivadon ĉi-rilatan pere de Esperanto, tiukaŭze mi estis honorigita per Korczak Memor-Medalo de Internacia Asocio je la nomo de Janusz Korczak, ankaŭ vokita Honora Membro de Pola Korczak-Komitato”.

Jarosław Abramow-Newerly, la filo de Igor Newerly, la aŭtoro de ĉi tiu ekscita legaĵo, sendis la 29an de julio 2004 leteron al Agnesa Eremija, ke ŝi rajtas traduki kaj eldoni la verkon kiel nekomercialan publikaĵon. Pro tio ni estas dankemaj al la tradukintoj, kaj samtiel al ĉiuj kiuj faris ĉion, por ke la verko estu atingebla al la legantaro.

**Tatjana Cvejn**

## TYBURCJUSZ TYBLEWSKI — la fama „TIBURĈJO”

La 1an de aprilo 2005 pasis la 72a datreveno de la naskiĝo de profesoro Tyburcjusz Tyblewski — fame konata inter miloj de geamikoj kiel Tiburĉjo.

Li vivas en la memoro de gesamideanoj tamen ni provu montri Lian silueton — kiel la Homon.

Li naskiĝis en Sempolno (vojevodio de Konin) kiel la tria infano de Adam kaj Stefania el Czarkowski-familio. Gepatroj mastrumis propran vendejon kun oferto de teksaĵoj. En la jaro 1943 Lia patro estis lokigita en la hitlernazian tendaron en Oranienburg (Germanio) kaj li restadis tie ĝis la jaro 1945. La plej maljuna frato ankaŭ estis forportita al labor-tendaro, de kie li revenis nur post la II mondmilito. La partoprenado de patro kaj frato en la politika orientado por Piłsudski ekfaris, ke post la milito Lia familio estiĝis objekto de persekutoj kaj tio venigis fraton Tadeon al armita kaŝitforma batalo. Li malkaŝis sin nur post anoncigo de la amnestio en 1947 jaro.

En la jaro 1948 Tyblewski-Senjoro kune kun du filoj ekloĝis en Sobieszewo (nun loĝkvartalo de la urbo Jelenia Góra). Unu jaro pli poste venis tien la patrino kun gefratoj.

Tyburcjusz frekventis multajn mezlernejojn en Sempolno, Cieplice, Jelenia Góra kaj en Vroclavo. Kiel „tre

obeema” lernanto Li estis el tiuj lernejoj forigata sub diversaj pretekstoj. Li ankaŭ lernis samtempe laborante.

En la jaro 1951 en Jelenia Góra Li akiris kvalifikaĵojn de turisma ĉiĉerono kaj unu jaron pli poste Li finis en Vroclavo kurson de Esperanto.

En la jaro 1953 Li komencis militservon en 5a Regimento de Infanterio Saska en Międzyrzecz Wielkopolski. En tia suboficira lernejo Li trapasis akran soldatan edukigon „kiel la elemento etburĝa”. Post la finiĝo de la soldatservo Li revenis al gepatroj kaj dum la jaroj 1955–57 Li laboris kiel la montara savanto en Karkonosze-montaro.

Aŭtune 1957 Li edziĝis kun Urszula Stopówna-Wieniawska kaj ekloĝis en Przesieka. Post divorco en la jaro 1959 Li edziĝis denove kun Urszula Adamska elhejme Wieśniwska (en 1961 jaro) kaj laboris en diversaj edukaj-kulturaj filioj en Jelenia Góra.

En la jaro 1961 Li abituriĝis en Ĝeneralkleriga Liceo por Laborantoj kaj unu jaron pli poste komencis studojn en Fakoj de Psikologio kaj Pedagogio de Varsovia Universitato. La magistran diplomon Li akiris en 1968 jaro surbaze de la scienca laboro — „Esperantismo — faktoro de internacia edukado”.

En februaro de la sama jaro Li travivis infarkton, sed post la periodo de resaniĝo Li revenis por la scienca laboro kaj en la jaro 1975 Li ricevis la sciencan gradon — doktoro de humanismaj sciencoj, post la defendo de la disertacio — „La eduka rolo de la turisma ĉiĉeronado”.

Dum la jaroj 1963–73 Li laboris en Fakaj Lernejoj kiel instruisto de la pola lingvo, Esperanto–lingvo kaj kiel estro de postlecionaj lernookupoj.

En la jaro 1973 Li estis laborigita kiel edukisto de psikologio kaj pedagogiko en Porinstruista Studumo en Jelenia Góra kaj post ĝia transformiĝo al Centro de Perfektigado de Geinstruistoj en 1975 jaro — kiel adjunkto.

Samtempe, kiel adjunkto en Wrocław Universitato Li gvidis magistran seminarion (Li estis la protektanto de 24 magistrigaj laboroj) kaj lekciis socian pedagogion kaj pedagogion de edukado de plenkreskuloj.

En la jaro 1977 Li estis forigita el la Centro de Instruista Perfektigado lige kun la entrepreno de sciencaj esploroj pri geinstruista aŭtoportreto. Dum unu jaro Li laboris kiel anstantaŭanto de la direktoro de Agentejo de Artaj Aranĝoj de Karkonosze–Regiono kaj pli poste oni konfidis al Li estradon de Memstara Laborejo de Sansociologio en Instituto de Socia Medicino en Wrocław Medicina Akademio (altlernejo).

La dua infarkto en la jaro 1980 kaj ricevo de rento forŝovis Lin de la reprezalioj de la milita stato — la 13an de decembro 1981.

Kiel aganto–esperantisto Li ekfarris multajn vojaĝojn tra Eŭropo (Belgio, Nederlando, Germanio, Francio) kaj dum la jaroj 1986–1987 Li ekfarris unujaran staĝon en profesia Centre Culturel d’ Esperanto en Svislando, pliriĉigante spertojn kaj scion en la fako de la praktika psikologio kaj kunlaborante kun sciencaj centroj, okupiĝantaj pri interetna kulturo.

En la jaro 1987 Li estiĝis docento de Akedmio Internacia de la Sciencioj (AIS) en San Marino en Fako de la Sciencoj pri Hom–Medio kaj unu jaron pli poste li docentraĵtiĝis per la dulingva laboro — „Psikologie socia problemaro de la internacia turismo”.

En la jaro 1990 Li estis vokita al la scienca grado de profesoro kaj pli poste estis dekano de VI Fako — Sciencoj pri Hom–Medio kaj membro de Senato de Akademio de la Sciencoj en San Marino.

Tyburcjusz Tyblewski estas la aŭtoro de multaj noveloj kaj rakontoj skribitaj en la pola lingvo kaj en Esperanto. Por la tradukoj de la poezio de Tadeusz Różewicz kaj por la propra novela kreado Li estis premiita en internaciaj konkursoj belartaj (Rotterdam, Helsinki, Vancouver).

Li estis membro de Pola Sociologia Asocio, Pola Psikologia Asocio, Internacia Asocio Esperantista kaj Esperantista Verkista Asocio.

Por multaj miloj de la polaj kaj alilandaj esperantistoj kaj por multaj geamikoj sinjoro Profesoro Tyburcjusz TYBLEWSKI estis simple — TIBURĈJO. Estis kaj restas por ĉiam

***Eble la unuan fojon en la historio de la pola Esperanto-movado esperantisto gajnis ĝeneralan popularecon en sia loĝloko pro sia agado por la lingvo internacia. Tiel okazis en Malborko.***

## **Malborkano 2004**

„NOWA GAZETA MALBORSKA” anoncis plebisciton „**Homo de la jaro 2004 en Malborko**”. La redakcio proponis 12 kandidatojn, grandparte politikistojn, interalie urbestron kaj vicurbestron, du deputitojn al Sejmo, vicprezidanton de Pomeria Sejmeto kaj distrikestron. Estis proponita ankaŭ pastro konata pro sia socia agado, mondĉampionino (fortikulino) kaj 16-jaraĝa knabo, kiu en la jaro 2004 konkeris ambaŭ polusojn de la terglobo. Oni lasis al la legantoj de la „NGM” la eblecon proponi aliajn kandidatojn. Sume estis proponitaj 20 personoj. Sur la liston trafis ankaŭ prezidanto de la Esperanto-Klubo „Kastelo”, d-ro Edward Kozyra.



tre kore rilatanta mem al ĉiuj, ĉiam ridetanta ĝentila HOMO, bonega Amiko kaj Granda Esperantisto.

TIBURĈJO — bonvolu esti inter ni por ĉiam.

**Stanisław Śmigielski**

Prilaborita laŭ la libro de Antoni Lenkiewicz, *Polacy na przełomie XX i XXI wieku*, tom I, Wrocław 1998.

Dum kelka tempo la ĵurnalo publikigis kuponojn, sur kiuj oni povis skribi nomojn de siaj favoratoj kaj sendi al la redakcio. Tiel funkciis la plebiscita voĉdonado. Alvenis sume 3116 kuponoj. La unua loko (995 voĉoj) estis memkompreneble rezervita por la konkerinto de la polusoj, Jan Mela, la vera heroo de niaj tempoj. Konsideru la fakton, ke li estas handikapulo, uzas kruran protezon sube de genuo kaj ne havas dekstran antaŭbrakon. La duan pozicion certigis al si la paroĥestro Krzysztof Miś (779 voĉoj), kiu siajn farojn rilate al rekonstruado de historiaj monumentoj, povis prezenti de la predikeja pulpitro. La tria, „bronza” loko okupita de esperantisto evidentiĝis surpriza. Edward Kozyra ricevis 417 voĉojn. Tiuj tri personoj kolektis sume 2191 voĉojn, ĉiuj aliaj 17 pretendantoj gajnis kune nur 925 voĉojn.

La 21an de marto 2005 en restoracio de la hotelo „Dedal” en Malborko okazis la solena enmanigo de „Nike-statuetoj”. Tamen mankis la ĉefa laŭreato Jan Mela, kiu ĝuste tiam estis honora gasto en „Explorers Club” en Nov-Jorko kiel la plej juna membro de tiu elita Klubo. Anstataŭis lin lia tuta familio, la gepatroj kaj du fra-

tinaj. Kiam oni enmanigis la statu-eton al Edward Kozyra, informante, ke li estas esperantisto — Ursula Mela, la patrino de Jan publike diris: *Mi antaŭ jaroj finis elementan kurson de Esperanto en la mezlernejo, kiun gvidis via edzino Irena Kozyra*. La patro de Jan promesis, ke la tuta familio, kompreneble kun Jan Mela, venos al Esperanto-Klubo „Kastelo”.

Kiel klarigi la sukceson de nia samideano? Edward Kozyra, naskiĝinta en la jaro 1951, estas doktoro de veterinaro. Vivante en la agrikulture riĉa regiono de la baslando ĉe la elfluo de Vistulo, li prosperis. Tamen la politikaj kaj ekonomiaj transformiĝoj fine de la 20a jarcento kaŭzis kolapson de la tiea agrikulturo. Draste malgrandiĝis la labortempo de d-ro Kozyra kiel veterinaro, sed proporcie kreskis tiu de s-ano Eduardo kiel esperantisto. Li estas temperamenta agohomo, kiu ne konas ripozon. La grandan parton de sia energio li dediĉas al Esperanto.

Esperantisto li iĝis en la jaro 1973 dum la studado en Vroclavo (Veterinara Fakultato de Agrikultura Akademio). Lia edzino Irena instruistino de la franca lingvo kaj de Esperanto, ankaŭ parolas ruse kaj germane. Ambaŭ filinoj parolas Esperante. La pli aĝa Magda krome parolas germane, ruse, angle, france, nederlande kaj ankaŭ regas latinon. Ŝi finis juron kaj ekonomion en la Viadrina Universitato en Frankfurto ĉe Odoro. En sia kariero ŝi jam instruis la germanan literaturon en usona universitato en Columbus (Ohio), laboris kiel inter-

pretisto en Bosch-Fondaĵo en Stuttgart kaj gvidis projektojn destinitajn ĉefe por aziaj landoj. Baldaŭ ŝi laboros en Bosch-Firmao en Hindio. Ŝi instruos tie la germanan lingvon kaj jam komencis lerni la hindian. La malpli aĝa Eva aŭtune komencos studi en Stuttgart (Germanio).

En la jaro 1999 Edward Kozyra fondis Esperanto-Klubon „Kastelo”. Kune kun siaj klubanoj li ordigis malzorgitan placon en la centro de la urbo kaj ricevis oficialan permeson nomi ĝin „Skvaro de Esperanto”. Inaŭguro de la skvaro vekis interesiĝon de la lokaj komunikiloj, kio instigis la klubanojn lanĉi novan projekton, nome „Parkon de la Mondo”, kie elstaraj esperantistoj el diversaj landoj enplantas siajn „naciajn arbojn”. Jam kreskas 26 tiaj arboj. Apud ĉiu troviĝas ŝtono kun Esperantlingva informo pri nomo de la arbo kaj de la persono, kiu ĝin plantis. Tiamaniere Malborko kun siaj 31 ZEOj fariĝis mondĉampiono pri tiu afero.

Multaj eminentaj nomoj estas gravuritaj sur la ŝtonoj, interalie tiu de prof. Reinhard Selten, Nobelpremiito, kaj tiu de Etsuo Miyoshi, la japana industriisto [vidu PE 1/2005]. Post la enplanto de la japana ĉerizujo okazis spektakla preĝado laŭ la rito de Oomoto, kio vekis grandan interesiĝon de la komunikiloj. Poste sekvis sensacia deklaro de la japana milionulo pri lia deziro starigi fabrikon en Malborko. Surbaze de tiuj eventoj estis produktita filmo „Obleżenie Malborka” („Sieĝo de Malbor-

ko”), kiun dufoje prezenti la 1a kanalo de la Pola Televido. Sen la plifrua aktivado de Eduardo Kozyra, la filmo neniam ekestus.

La prestiĝa tria pozicio en la plebiscito por la „Homo de la Jaro 2004 en Malborko” malfermas antaŭ nia samideano novan perspektivon. Ni observu liajn pluajn iniciatojn, sed eble ankaŭ provu imiti lian ekzemplon.

**Roman Dobrzyński**

## **SIEĜOJ DE MALBORKO**

**Kiel longjara ĵurnalisto de la Pola Televido mi aŭdis de tempo al tempo samideanajn postulojn pli multe propagandi Esperanton. Mi ĉiam respondis: „Esperantistoj, donu al mi ŝancon, faru ion, kio povus esti interesa por televido”. Tia ŝanco finfine aperis en Malborko.**

### **Verdaj ZEOj**

Malborko, urbo situanta en la norda Pollando, famas pro sia historia monumento registrita de UNESCO kiel kultura heredaĵo de la homaro. Ĝi estas teŭtona kastelo el la 13a jarcento, la plej granda en la mondo gotika brikkonstruaĵo. En Esperantujo Malborko meritas famon kiel la urbo de plej multaj ZEOj. Aktuale ili estas 31, sed ilia nombro daŭre kreskas. Preskau ĉiuj malborkaj ZEOj troviĝas en tiea „Parko de la Mondo”. En ĝia centro okulfrapas ŝtonego kun medaliono de Ludoviko Zamenhof.

La parkon iniciatis fondinto de la Esperanto-klubo „Kastelo” Eduardo Kozyra. Kune kun siaj klubanoj li ordigis malzorgitan placon en la centra parto de la urbo kaj laŭ permeso de urbaj instancoj nomis ĝin „Esperanto Skvaro”. Baldaŭ kreskis razeno, floroj kaj arboj. Okaze de inaŭguro de la skvaro la lokaj amaskomunikiloj ekinteresiĝis pri la afero. Tio spronis la klubanojn lanĉi novan ideon, nome inviti eksterlandajn esperantistojn, ke ili enplantu siajn „naciajn” arbojn. Unue estis enplantitaj la „korea alizujo” kaj la „germana kverko”.

Tiamaniere naskiĝis la „Parko de la Mondo”. Apud ĉiu arbo troviĝas ŝtono kun Esperantlingva informo pri arbo mem kaj pri persono, kiu ĝin plantis. Tiuj ŝtonoj estas la malborkaj ZEOj. La unuan fojon mi iris tien somere 2001, akompanante la novelektitan prezidanton de UEA, Renato Corsetti, kiu enplantis larikon, simbolantan Italion. Mi kunhavis kameron kaj registris scenojn, kiuj ŝajnis ĝerموj de interesa publikaĵo.

### **Blua fadeno**

Baldaŭ okazis sensacia vizito de prof. Reinhard Selten. Pri Malborko subite ekinteresiĝis amaskomunikiloj. Mi filmis la scenojn en la parko kaj akiris intervjuon de la eminenta Nobelpremiito, kiu en perfekta Esperanto rakontis pri la problemoj de multlingveco en la Eŭropa Unio. Tiamaniere prof. Selten metis en mian manon la „bluan fadenon”. Ĝuste tiam la prioritata temo de propagando estis la proskimiĝanta aliĝo de dek



ŝtatoj al la Eŭropa Unio. La Malborka afero saturita per Eŭrop–uniaj akcentoj prezentiĝis kiel materialo taŭga eĉ por dokumenta filmo.

Mi estis certa, ke la TVP akceptos mian projekton, kiam la Malborkaj esperantistoj regalas min per nova ŝanco. Dank' al iliaj kontaktoj kun samideanoj en Mariboro, ĉefe Jovano Mirkoviĉ estis ligitaj oficialaj rilatoj inter la urbestroj de ambaŭ urboj. Printempe 2003 grupo de urbaj kaj distriktaj aŭtoritatuloj kun esperantistoj el Malborko vizitis la slovenan urbon. Esperanto bone funkciis kiel laborlingvo, al kio ankaŭ kontribuis la loĝanta tie kroato, Zlatko Tišljar. La poloj revenis hejmen kun la novtranĉitaj branĉetoj de la plej malnova en Eŭropo vito. La Maribora ŝoso estis enplantita en la Malborka parko.

Sekve la urbestro de Mariboro, Boris Soviĉ revizitis Malborkon. Apud la muregoj de la giganta kastelo li enplantis alian vitŝoson kaj diris jenajn vortojn, kiuj perfekte taŭgis kiel konkludo de la virtuala filmo: **„Eŭropo fariĝas nia komuna domo. Esperantistoj iniciatis kontaktojn inter niaj urboj kaj samtempe proponis la formulon de reciprokaj rilatoj, bazitan sur la principo de egaleco. Nia vito enplantita en via urbo estu simbolo de la komunaj valoroj, kiuj konsistigas la ideon de eŭropeco, ĝi estu ĝermo de la eŭropa identeco, komprenata samsence de la grandaj kaj malgrandaj popoloj. Estonteco apartenas al Eŭropo unuiĝanta laŭ tiu**

**ĉi principo, ĝi estu modelo por la tuta mondo”.**

### **Japana kontribuo**

Julie 2003 la nordpolan urbon vizitis la japana industriisto kaj oomotano, Etsuo Miyoshi. Li enplantis la „japanan ĉerizujon” kaj inaŭguris memorŝtonon. La ceremonion antaŭis diservo laŭ la rito de Oomoto, kiu forte impresis la amase kolektiĝintan publikon kaj ĵurnalistojn. Ĝi ŝajnis intence preparita sceno por ornami mian filmon. Tamen la saman tagon mi filmis malpli ornaman, sed pli gravan scenon. La japana „reĝo de gantoj” ekinteresiĝis pri Malborko kiel eventuala investloko. Li konstatis, ke la urbo povus fariĝi lia pordo al Eŭropa Unio. La klare esprimita de Etsuo Miyoshi intenco pri investo de kapitalo en Malborko estis tuj laŭtigita fare de amaskomunikiloj. Esperanto ekhavis novan dimension. Jen pere de la lingvo internacia venis eksterlanda milionulo kaj pensas starigi fabrikon en la urbo, kie koeficiento de senlaboreco atingis 37%.

En tiu momento mi jam havis la plej gravajn elementojn de la filmo. Estis bezonata nur atrakcia komenco, sed ne necesis ĝin inventi. Ĉiun someron okazas en la urbo granda festo nomata „Sieĝo de Malborko”. Ĝi rememorigas eventojn de la jaro 1410, kiam la teŭtona kastelo, germane nomata Marienburg, estis sieĝata tuj post la okazinta proksime batalo, unu el la plej grandaj militkonfrontoj de la mezepoka Eŭropo. La feston konsistigas

diversaj kulturaj aranĝoj kaj multaj turniroj, en kiuj luktas 350 kirasitaj kavaliroj. Kelkaj bone filmitaj batal-scenoj sufiĉis por atrakcie komenci la filmon. Ne eblis preteratenti la mirindan fortreson kiel atrakciaĵon en si mem. Mia scenaro estis senprobleme aprobata kaj komnciĝis ĝia realigado.

### **Televida filmo**

La filmo „Sieĝoj de Malborko” estis dufoje prezentita en la unua kanalo de la Pola TV kaj kelkfoje ripetita en la kanalo por la pola diasporo en la tuta mondo. Spektis ĝin kelkaj milionoj da homoj. Esperanto kaj esperantistoj tute nature ekludis en ĝi gravan rolon. Estis bona okazo por ekspone ilian kontribuon al evoluigo de la urbo. La prezidanto de la Esperanto-klubo Eduardo Kozyra diris interalie: ***Esperantistoj ekzistas en preskaŭ 200 landoj. Ni kredas, ke post kelkaj jaroj sama nombro da arboj kreskos en nia parko. La celo estas allogi al Malborko gastojn parolantajn Esperanton. Ĉiam pli da ili alvenas. Oni povas diri, ke esperantistoj sieĝas Malborkon.***

La lokaj aŭtoritatoj rimarkis en la filmo alian avantaĝon, iliaj vizaĝoj aperis tutlande. Ĉiu scias, ke en la nuna „bildepoko” politikisto, kiu ne ekzistas televide, tute ne ekzistas. Por provinca politikisto penetri tutlandan televidkanalon estas same malfacile kiel trapasi la biblian kudriltruon. Sed mi mem ankaŭ profitis. La urbestro Jan Wilk invitis min partopreni publikan seancon de la filmo. En la plej

granda salono de Malborko kolektiĝis elito de la urbo. Post la spektaklo aŭdiĝis aplaŭdoj. Memkompreneble mi ĝuis ilin, ĉar kompatindaj televidaj ĵurnalistoj, kies verkojn spektas milionoj, kutime ne aŭdas aplaŭdojn. Sekve okazis kortuŝa solenaĵo, dum kiu oni distingiĝis min pro meritoj por la urbo.

Venis gratuloj de polaj esperantistoj. Tamen unu samideano aldonis al sia laŭdo riproĉeton; li bedaŭris, ke en la filmo estas ne sufiĉe prezentita Esperanto mem. Vere, li ne povis pli trafe komplimenti min. Ĝuste mia zorgo estis tiel aranĝi la filmon, ke oni ne sentu ĝin reklamo de la lingvo internacia. Efektive tiel okazis, Esperanto ekfunkciis kiel normala lingvo, parolata kaj utila, pere de kiu oni promocias la urbon kaj eĉ allogas eksterlandan investkapitalon. Ĝuste tiel perceptis ĝin ankaŭ mia estro.

### **Esperplena balono**

Junie 2004 mi forveturis al Ĉinio laŭ invito de la ĉina ministerio pri eksterlandaj aferoj kun la celo fari kelkajn filmojn por la TVP. Priparolante kun mia ĉefo temojn, mi menciis la koincidence okazontan Universalan Kongreson de Esperanto en Pekino. Li aprobis la proponon fari raporton pri la kongreso, des pli volonte, kiam li eksciis pri la ebleco daŭrigi la „malborkan temon”. En Pekino mi intervjuis sinjoron Miyoshi, kiu interalie deklaris: ***Mi volas fabriki bastonvalizojn en Malborko. Mi investos du milionojn da eŭroj. Per mia decido mi povas helpi mul-***

## **tajn senlaborulojn en Malborko kaj kontribui por la lando.**

Sed ne nur pro tio la TVP bone akceptis la filmon „Muroj de miljaroj”. La Pekina kongreso kun la lingva egaleco kiel la ĉeftemo trafis la bezonojn de amaskomunikiloj. Tiu temo estis forte akcentita en la filmo. Efike helpis min per siaj eldiroj la aktuala kaj eksa prezidantoj de UEA, Renato Corsetti kaj Humphrey Tonkin. Nun la filmo atendas emision. Sed jam multaj esperantistoj spektis ĝian Esperantigitan varianton. La 11an de marto 2005 en la malborka kastelo okazis publika antaŭpremiera seanco de ĝia originala, pola versio. Memkompreneble la malborkanojn plej interesis la epizodo kun la japana industriisto. Ili volonte reaŭdis la deklaron pri investo, kiu jam septembre 2004 aperis en la ĵurnalo „Rzeczpospolita” en la intervjuo kun Etsuo Miyoshi sub la titolo „Kial mi investas en Pollando?”

Esperanto faris en Malborko multajn „esperantojn”. La espero leviĝas super la urbo kiel granda balono. Jam aperis skeptikuloj, kiuj konsideras, ke la tropumpita balono krevos kaj sekvos katastrofo. Por Esperanto. Fakte la prokrasto de la investo — kiel ĵus informis s-ro Miyoshi — rezultas el la ne solvita ankoraŭ problemo ellabori radetojn kaj tenilojn por la bastonvalizoj, por ke ili estu kunportebaj al aviadiloj. Verdire granda plimulto da malborkanoj firme kredas, ke la espero plenumiĝos. Tial la esperantisto Eduardo Kozyra okupas la trian lokon en la plebiscito por la „plej populara malborkano de la jaro

2004”. Li superis ĉiujn politikistojn. Ni kredu, ke la „malborka fenomeno” okupos gravan lokon en la historio de nia movado, ĉar la starigo de fabriko en tiu loko kaj en tiu momento pli efike propagandos Esperanton ol mil surpaperaj teorioj, proklamoj kaj rezolucioj.

**Roman Dobrzyński**



## **Sukcesa 100-jara jubileo**

Laŭplane okazis en Bulonjo-ĉe-Marŝo simpozio organizita de UEA, kaj internacia amikeca renkontiĝo organizita de Nordfranca Esperanto-Federacio, kune kun pluraj aliaj asocioj: UFE, SAT-Amikaro, Franca Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, JEFO, Belga Federacio, kaj Brita Esperanto Asocio.

Ambaŭ aranĝoj estis tre sukcesaj; ili allogis multajn partoprenantojn, kaj la programeroj estis senescepte altnivelaj: prelegoj de fakuloj, distraj aranĝoj, ekskursoj.

Certe la plej emocia momento estis la sabata mateno, kiam oni inaŭguris la renkontiĝon en la sama teatro kiel en 1905, kaj poste parade iris tra la urbo al la Zamenhof-placo, kie staras la busto de la kreinto de Esperanto.

Pli detala raporto sekvos poste, sed eroj jam estas aŭskulteblaj en la elsendoj de Pola Radio.

**Claude Nourmont**

## Novajŝervo de la Pola Sekcio de ILEI

Karaj ILEI-membroj,

Mi havas plezuron prezenti al vi novan kunlaboranton de nia sekcio.

Piotr Nosek estas 33-jara diplomito de du filologioj: turka kaj persa (Jagelona Universitato) kaj flue parolas plurajn lingvojn. Pri vulkanoj li scias preskaŭ ĉion. Li laboras en sia unupersona lingva kaj turisma firmao. Unu el liaj taskoj estos dissendado de informoj de nia „Retmesaĝa kaj SMS-a Novajŝervo”.

Ni starigas „Interretan Novajŝervon de la Pola Sekcio de ILEI”, kiu daŭrigos nian informadon pere de LIGILO ekde 1996. Antaŭ ol ĝi aperos en la (funkciigota post kelkaj monatoj) retpaĝo de la Pola Sekcio de ILEI, funkcios nia retmesaĝa kaj somosa servo. Poste tiun daŭre ni uzos por dissendadi nur urĝajn aŭ speciale gravajn novaĵojn, dum ĉiujn informojn oni povos regule legi en nia retpaĝo, pri kies funkciigo ni informos vin. Nun ni povas nur diri, ke la paĝo estos ne nur moderna, sed ankaŭ bela.

Daŭre aperados „Ligilo” por la polaj ILEI-membroj kun aldonaj, eksternovajŝervaj informoj, artikoloj kaj aliaj materialoj — en elektronika versio, kaj — se estos necese — ankaŭ en papera.

La celo de nia Novajŝervo estas:

- LIVERADI al la polaj ILEI-membroj, kunlaborantoj, studentaj E-rondoj, al la Estraro kaj Komitato de ILEI mondskala kaj foje al diverslandaj esperantistoj akiritajn de ni INFORMOJN PRI GRAVA AGADO DE POLAJ instruistoj, universitataj medioj kaj aliaj esperantistoj, informojn pri faktoj EL EKSTERLANDO, kiujn eblas al ni prilabori dank’al kontakto kun la koncerna realo;

- PERADI al la polaj instruistoj, kun-

laborantoj, studentoj GRAVAJN INFORMOJN EL LA TUTA MONDO.

La objekto de nia intereso estas faktoj inspirantaj agadon, kaj informoj, i.a. pri la prestiĝo de Esperanto, utilaj en informado pri la Internacia Lingvo,

- ORGANIZADI/KUNORDIGADI iujn agojn.

Kiel videblas, nia celo estas INSPIRADI AGADON. La novajŝervo ne havas ankoraŭ nomon. Eble vi havas ideon?

Koncizajn informojn por la Novajŝervo bv. sendadi al Piotr Nosek (piotr. esp@gmail.com) kaj kopie al mi (mmajerczak@gmail.com). Krome, ni invitas vin verki artikolojn por Ligilo kaj Internacia Pedagogia Revuo.

Kun koraj kaj amikaj salutoj

**Maria Majerczak**  
**prezid. de la Pola Sekcio de ILEI**



La baza lernejo en Czajowice apud Ojców (vidu: IPR, 2004, p. 28) invitis reprezentanton de ILEI al la debato pri TOLEREMO (precipe rilate maljunulojn kaj handikapitojn), kiu okazos en la lernejo la 21an de marto. Videblas, ke tie oni komprenas la ideon de Eo, kaj por ni tio estas okazo montri, kiel dank’ al la lingvo estas realigata toleremo.

Esperantistoj povas porti al la edukistemo tiujn valorojn, nedisigeblajn de la lingvo, kaj kun ili — Esperanton.

La debato, gvidota de infanoj, okazas kadre de la EU-projekto „La Tago de la Printempo en Eŭropo”, kies ĉeftemo estas la valoroj entenataj de la Eŭropa Konstitucio.

Eblas ricevi la tekston de la pollingva ĉi-okaza prelego de Maria Majerczak prezentota en la lernejo kaj uzebla en similaj okazoj. Petu la tekston ĉe la Novajŝervo (ne 30.III— 16.IV).

# UEA TIRAS ATENTON DE UN–KOMISIONO AL LINGVAJ HOMAJ RAJTOJ

el *Gazetaraj Komunikoj de UEA*  
fonto: „Ret-Info”

Pro siaj konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, UEA havas la rajton liveri al UN–organoj skribajn dokumentojn, kiuj rilatas al tagordaj punktoj de iliaj kunvenoj. Uzante tiun eblecon prezidanto Renato Corsetti sendis dokumenton al la Komisiono de UN pri Homaj Rajtoj por distribuo inter la membroj de ĝia 61a sesio, kiu kunvenos en Ĝenevo de la 14a de marto ĝis la 22a de aprilo. La dokumento rilatas al la tagorda punkto, kiu pritraktos la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn.

UEA atentigas la Komisionon, ke laŭ la dua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en la Deklaracio apartenas al ĉiuj homoj sen diferencigo i.a. laŭ lingvo, sed malgraŭ tio UN kaj ĝiaj membroŝtatoj donis al la lingva aspekto de la homaj rajtoj malmulte da atento ĝis nun.

La dokumento de UEA elstarigas la negativajn sekvojn de la edukado de infanoj en alia lingvo ol la gepatra. Laŭ multaj esploroj uzo de netaŭga lingvo en lernejo estas unu el la plej gravaj kaŭzoj, aŭ eĉ la plej grava kaŭzo, de antaŭtempa forlaso de lernejo, kiu siavice kondukas al seriozaj sociaj problemoj, ĉar ĝi pligrandigas la riskon je senlaboreco, krima-

do, alkoholismo kaj drog–uzado. Laŭ studo de UN mem, la plej malriĉaj landoj povus ŝpari grandegajn sumojn, se la lingvaj homaj rajtoj de iliaj loĝantoj estus respektataj per la uzo de lokaj lingvoj en instruado.

Pli ĝenerale UEA komentas ankaŭ la uzon de nur kelkaj difinitaj lingvoj por kontaktoj inter homoj de malsamaj popoloj kiel malkontentigan kaj diskriminacian praktikon kaj kiel kontraŭdiran al la dua artikolo de la Universala Deklaracio.

UEA proponas, ke la Komisiono starigu laborgrupon por pristudi la problemojn de lingvaj homaj rajtoj kaj la malobservon de homaj rajtoj pro lingvaj malegaleco kaj maljusteco. En sia raporto la laborgrupo devus proponi mez– kaj longperspektivajn agojn por certigi lingvajn homajn rajtojn en diversaj lingvaj kaj kulturaj situacioj. La Komisiono devus ankaŭ apogi la klopodojn de fakuloj, interalie de UEA, esplori kaj eksperimenti la plej efikajn manierojn elekti la lingvojn uzotajn en lerneja instruado, kun la celo respekti lingvajn homajn rajtojn kaj kuraĝigi la evoluon en la koncernaj landoj. UEA ankaŭ renovigas sian malnovan proponon, ke la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN metu la temon „Lingvaj kaj Homaj Rajtoj” en la tagordon de unu el siaj estontaj kunvenoj.

# Esperantistoj en Eŭropa Parlamento

Merkredo, la 23an de februaro, estis speciala tago en la Eŭropa Parlamento. Probable por la unua fojo oni parolis tie ne nur pri Esperanto, sed Esperanto estis la laborlingvo de la oficiala kunveno.

Matene, tuj post la matenmanĝo, grupo da dekkelkaj personoj el naŭ landoj, parolantaj denaske 11 lingvojn, foriris la Kulturano Centron de Sankta Tomaso en Ŝtrasburgo (Centre Culturel St-Thomas) direktigante al la Eŭropa Parla-mento. La grupon gvidis la organizinto de la evento germana pastro **Bernhard Eichkorn** el Villingen.

Preskaŭ ĉiuj estis en Ŝtrasburgo por la unua fojo kaj por la unua fojo en la sidejo de la Eŭropa Parlamento. La konstruaĵo estas kolosa. Aspektas kvazaŭ farita tute el ŝtalo kaj vitro, bluanta, ĉirkaŭita de vasta kanalo. La bluo de la konstruaĵo, la bluo de la akvo kaj la bluo de la ĉielo donas al la tuto vere pacan etoson.

Iom da tempo okupis vizitado



de diversaj flankoj de la interno kaj aŭskulto pri la funkciado de tiu internacia institucio. Venis **Dr. Andrea Schwab**, germana eŭrodeputito, simpatianto de Esperanto. Kun li venis ankaŭ **Norbert Lins**, kiu estas asistanto de la parlamentano kaj samtempe bona esperantisto. Komuna foto, en la por tiu celo destinita dense flagita loko, estos memoraĵo al ĉiu partopreninto.

En unu el multaj prelegejoj situitaj tuj ĉe la granda ronda parlamenta debato ni ĉiuj kunvenis. Nia interparolo tuŝis la lingvajn malfacilaĵojn ene de EP kaj de aliaj uniaj institucioj. Dron Schwab interesis inter alie la uzebleco de Esperanto por solvi la problemon. Venis pola parlamentano **Małgorzata Handzlik**. La diskuto vigliĝis, ĉar ŝi transdonis ankaŭ ŝiajn impresojn el la parlamenta laboro.

La kalkuleblaj kostoj de la tradukadoj de kunvenoj kaj dokumentoj formangas pli ol 30% de la buĝeto de la Eŭropa Unio. Kaj ne ĉiuj kunvenoj estas tradukataj. Kaj ne ĉiuj dokumentoj estas tradukataj al ĉiuj oficialaj lingvoj de EU, kvankam devus esti.

Kaj la kvalito de la tradukoj estas tuta aparta afero. En sia elpaŝo **Stanisław Mandrak**, la prezidanto de PEA, informis pri dekoj da seriozaj eraroj kaj mistradukoj en la polingva versio de la Konstitucia Traktato. La ĉeestanta EU-parlamentanoj

parolis pri diversaj mistradukoj de diversaj dokumentoj kaj eldiroj, kelkfoje tre ridindaj eraroj. Ne malofte dum voĉdonado la eŭrodeputitoj ekzemple demandas – kiun version ni voĉdonas? – la francan aŭ la anglan? – ĉar ili ne estas egalaj.

Resumante la diskuton ni poste provis diveni demandante sin: kiom da milionoj da novaj entreprenoj por milionoj da personoj oni povus krei por tiu mono, kiu nun estas senproduktive elverŝata por la sencelaj tradukoj... Se ne estus solvo..., tamen estas. Kaj tiu solvo estas **ESPERANTO**.

Poste ni partoprenis la ĝeneralan debaton gviditan de **Prodi** kaj poste voĉdonadon. En la Parlamentejo ni vidis voĉdoni ankaŭ niajn polajn EU-deputitojn, inter alie Bronisław Giermek, Maciej Giertych Bogdan Pęk.

Kiam ni foriradis, ni spektis diversajn presaĵojn kaj kelkajn kunprenis por memoro kaj eventuala pluuzo. Mi serĉis la pollingvan Konstitucian Traktaton. Vane. Estis aliaj, la pola mankis. Mi kunprenis la litovan tekston de la Konstitucio por la memoro de mia estado en la Eŭropa Parlamento.

**Andreo Marszałkowski**

P.S. Nia estado en Ŝtrasburgo celis ne nur la menciitan historian eventon en EP, sed estis multe pli riĉa kaj multtema. Pri aliaj punktoj de nia programo mi verkos pli por la venonta numero de PE.



# EUROSCOLA — ŝanco por disvastigi instruadon de Esperanto

Jam dum kelkaj jaroj en la sidejo de Eŭropa Parlamento, en Strasburgo, okazas (kutime unufoje jare) EUROSCOLA-tago, kun partopreno de E-klasoj.

Valoras, ke la polaj lernejoj sciuj pri tiu ebleco. Tio estas ŝanco por disvastigi la instruadon de Esperanto.

Utilas scii, kiel tio okazas kaj taksi, ĉu estas interese partopreni. Mi rakontos pri la lasta EUROSCOLA, kiu okazis la 28an de aprilo 2004. En la antaŭaj tagoj, E-gelernantoj renkontis gekolegojn el Finnlando, Britio, Slovenio, Rusio kaj Ukrainio. La grandan preparan kaj kunordigan laboron, ligitan kun la renkontiĝo de esperantistoj faris la finna sekciestriĉo de ILEI, Carola Antskog. Ni diskutis pri eŭropaj problemoj, i.a. demokratio, naturprotektado, la eŭropaj valoroj en la mondo, la rolo de junu-



laro en Eŭropo kaj estonteco de la kontinento. La organizantoj preparis ankaŭ lecionojn pri ĉi tiuj temoj. La laborlingvo estis Esperanto. Prelegis i.a. Zlatko Tisljar. Ĉiu nacia grupo prezentis artan programeton. Krome, ni vizitis la belegan urbon kaj ni amikiĝis kun reprezentantoj de aliaj landoj.

La tre bone organizitan Euroscola-tagon (28.IV) ni pasigis en Eŭropa Parlamentejo kun gejunuloj el preskaŭ tuta Eŭropo. Gelernantoj prenis lokojn de eŭropaj deputitoj, diskutis kaj voĉdonis pri diversaj aferoj ligitaj kun Eŭropo. Ili povis ankaŭ ekkoni la funkciadon de la institucio, viziti la Parlamentejon kaj partopreni kvizon pri Eŭropa Unio. Fine, ĉiuj klasoj ricevis la eŭropan flagon kaj ĉiu partoprenanto — diplomon subskribitan de Pat Cox — la tiama Prezidanto de Eŭropa Parlamento. EP pa-





gis parton de la partoprenkosto.

Tio estis interesa aventuro, kies plej grava avantaĝo estis — laŭ la partoprenantoj — kontakto kun la Parlamento kaj la sento, ke gejunuloj povas decidi pri la unuiganta Eŭropo.

Partoprenon de polaj gelernantoj el XXXI Liceo en Krakovo ebligis en-



gaĝiĝo de la Pola Sekcio de ILEI, kiu trovis la lernejon, instigis instruist-non partoprenigi lernantojn, gvidis E-kursojn (en 2001/02 — Magdalena Tatara, lingvoinstruistino; en 2004 — Małgorzata Nitekowska, studentino en la fakoj de la angla kaj Esperanto; ambaŭ junulinoj partoprenis poste Euroscola-n kune kun la lernantoj). Pola ILEI estis dekomence (kun unu escepto) la landa kunordiganto de Euroscola.

Ĉijare, printempe, ĝi denove okazos. Partoprenos lernejo el Bielsko-Biała. Pri tio okupiĝas gesinjoroj Handzlik.

**Magdalena Tatara  
el la Komisiono pri Euroscola  
de Pola Sekcio de ILEI**



## **Eŭropa skolta ĵamboreo!**

Bonvolu, vi kiu loĝas pli proksime al Anglio, kaj povas agadi pli bone ol ni, instigi, entuziasmigi al esperantistaj organizaĵoj kaj junaj sekcioj, por ke ili starigu budon kaj donu fulmajn kursojn de Esperanto en EuroJamb (se vi scipovas la anglan, vidu videoprezentojn kaj klarigojn pri tiu evento por ne-skoltoj: [www.eurojamlive.org/english/EuroJamTV.php](http://www.eurojamlive.org/english/EuroJamTV.php)).

La agado de eŭropaj esperantistoj estos pli grava kaj interesa ol la nia en Tutamerika Skolta Ĵamboreo. Vi havos ankaŭ la ŝancon rilati kun la skolta monda oficejo pli bone ol ni.

En tuteŭropa ĵamboreo vere estos lingvaj problemoj. Bona ŝanco por montri la solvon. Devas esti temo por la evento, la informiĝo pri tiu evento en la eŭropa esperantistaro ne estas bona. Nur danaj esperantistoj interesiĝis pri tiu afero. Estos bedaŭro, se vi „eŭropanoj” perdos tiun ŝancon junuligi Esperanton.

„EuroJam” estas tre grava evento kaj verŝajne tre malmultaj esperantistoj konscias pri ĝi.

Ĝis!!!

**Marcelo  
skoltaj@yahoo.com.ar**

## Estas interkompreniĝilo!

La nekutima evento okazis la 19an de marto en Góra (Pollando); la vizito de oficiala delegacio el kunamiki-ta germana urbo Herzberg am Herz. La gastoj el Germanio alvenis al Góra enkadre de la revizito, ĉar pasintjare inter 17–19 de septembro ili mem estis aranĝantoj de la kunveno en Herzberg. Jam tiam emerĝis, dum la interparoloj, la komencaj fazoj de la pensado pri la realigo de pilota projekto de kunlaboro de partneraj urboj, al kiu ekfervoriĝis la urbestro de Herzberg **Gerhard Walter**. Al tielmaniera disvolvo konvinkis lin la loka esperantista medio koncentrigita en Interkultura Centro Herzberg ([www.ic-herzberg.de](http://www.ic-herzberg.de)).

Pionireco de la projekto esprimos per la uzado de internacia lingvo Esperanto en la interkontaktoj. Ĝi estas la provo de plenumigo de aktuala bezono de la socioj de ambaŭ urboj, por kiuj la baza problemo en kunlaboro fariĝis la nekono de la lingvo de la partnero. Kaj ĝi grave li-



migis la kontaktoj de ambaŭ socioj grandskale.

La ideo por nova kvaliteco de ĉi tiu kunlaboro, firmigita nome **Peter Zilvar** el Herzberg, nomiĝas ESPE-RANTO. Uzota por la kontaktoj neŭtrala lingvo internacia celas ŝanĝi la situacion.

La ĝemela kunlaboro de ambaŭ urboj, kiuj havas „monton” en sia nomo (berg = monto en la germana kaj góra = monto en la pola), ekkomencis antaŭ dekelkaj jaroj. Ĝia ĉefa iniciatinto estis **Günter Rasper** eksloĝanto de tiu Malsuprasilezia urbeto. Kun la oferto de la kunlaboro li trafis al la tiama urbestro **Tadeusz Tutkalik**. Jam tiam kun unuopaj esperantistoj el Góra kontaktiĝis esperantistoj el Herzberg.

La oficialan kontrakton pri la ĝemela kunlaboro de ambaŭ urboj oni subskribis la 23.10.1993 jaro. Dum dekelkaj jaroj oni aranĝadis ĉefe la kulturalan interŝanĝon kaj interŝanĝon de junuloj, kaj ankaŭ oni ekkomencis la kontaktojn sur la sporta kampo. Laste oni diras pri la interŝanĝo de grupoj de kurantoj el ambaŭ urboj kaj pri ilia partopreno en la sportaj aranĝoj aranĝataj en Góra kaj Herzberg.

La marta vizito de la urbestro de Herzberg **Gerhard Walter** en Góra estis antaŭita per intensa interreta rekono de la situacio de Esperanto en la ĉirkaŭaĵo. Tiam mintriĝis, ke en la Góra mem la aktivaj esperantistoj efektive ne estas. La plej favora esperantistino **Alfreda Onufrejczyk** mortis antaŭ kelkaj semajnoj,

kaj aliaj estis disaj, oficiala grupo ne estis. En tiu situacio, informitaj pri la bezono, esperantistoj el Vroclavo ekmovigis la kontaktojn en la proksimeco de Góra. La plej proksime estis Andrzej Szczudło el Wschowa, kiu al la kunveno en Góra invitis aliajn lubuŝajn esperantistojn. La lubuŝan filion de Pola Esperanto Asocio reprezentis: **Władysława Kujaczyńska** (prezidantino de la filio), **Andrzej Kizkiel** el Lubsko (vicprezidanto kaj ano de la Ĉefa Estraro de PEA), **Bożena Pietrzyk** el Nowa Sól (anino) kaj **Andrzej Szczudło** (kunhelpanto de la kunveno). Kune kun esperantista subteno el Vroclavo en personoj de prezidanto de Silesia Esperanto-Asocio **Adam Pleśniar** kaj de iliaj anoj: **Edward Wojtakowski**, **Bogdan Dembiec** kaj **Andrzej Pękałski**, sabate la 19an de marto en restoracio „Opus” lubuŝaj esperantistoj sidigis por interparoli kun **Peter Zilvar** kaj **Ursula Zilvar** el Herzberg. Post nelonge montriĝis, ke estas ankaŭ ĉe la tablo la loka esperantistino, devenanta el Góra studentino de Zielonogóra Universitato — **Katarzyna Dziemierz**.

Dum la urbestroj de la ĝemelaj urboj preparolis kun la urba konsilantaro ŝancoj por la turisma kunlaboro, la ronda tablo en „Opus” varmiĝis de la ideoj por la enkonduko de Esperanto. Oni decidis, ke estas ebla la enkonduko de la instruado de la internacia lingvo en Góra de tuj. Gvidus ĝin **Bożena Pietrzyk** el Nowa Sól — emerita direktorino de lernejo en Siedlisko.

La lernadon unuavice partoprenus la lokaj instruistoj, kiuj somere veturus al Interkultura Centro en Herzberg por plibonigi la konon de la lingvo. Jam aŭtune ĉi jare, komence de la lerneja jaro ili povos komenci la instruadon de la internacia lingvo en lernejoj. La kalendaro de la agoj ŝajnas tre strekita, sed la skeptikistojn ni trankviligas, ke laŭ opinioj de specialistoj, por ellerno de Esperanto sufiĉas 20% de la tempo bezonata por ellerno de alia lingvo. Krome, se iu jam lernis alian fremdan lingvon, konas 20% da Esperanto-vortaro.

Dum la paŭzo en la debato esperantistoj iris al, situata en la centro de la urbo, strato kun la nomo de la kreinto de la internacia lingvo Esperanto — Ludwik Zamenhof, kie oni faris kelkajn memoraĵfotojn.

La projekto etreprenita per estraroj de Góra kaj Herzberg am Harz plenumas ĉiam plian bezonon de la sameca sento „Ni Eŭropanoj”. Do estas reala ŝanco, ke la projekto povos ricevi la subvencion de la Unuiĝinta Eŭropo. Menciinda estas fakto, ke Esperanto estas agnoskita kaj rekomendata per UNESKO.

Ĉe la fino de la debato en restoracio „Opus” alvenis la urbestro de Góra **Tadeusz Wrotkowski**, kiu kune kun la urbestro de Herzberg **Gerhard Walter** konfirmis la esperoj de esperantistoj je la rapida realigo de aspirema projekto de ambaŭ urboj — partnereco „esperante”.

La urbestro de Góra deklaris la volon de la kunlaboro kaj helpon en alveno ĝis potencialaj adeptoj de

# „Verdaj Arbetoj” lernas Esperanton

Jam de 1992 jaro en la Baza Lernejo nro 34 en Rybnik estas aranĝita dum nedevigitaj okupoj instruado de la lingvo ESPERANTO. Kiam mi komencis instrui, nur malmultaj gelnantoj volis lerni Esperanton. Ili pli frue nenion sciis pri la internacia lingvo sed volonte ekkonadis Esperanton.

Speciale ili tre ŝatis korespondadi kun geinfanoj el la tuta mondo. Mi serĉis por ili adresojn en multaj revuoj — *Monato*, *Juna Amiko*, *Esperanto* ktp. En ĉi tiuj okupoj partoprenas multaj gelnantoj. Mi gvidas ilin laŭ aŭtora programo, kiu estis konfirmita per Kuratorium Oświaty en Katowice. Malgraŭ tio, ke ĉi tiuj okupoj ne estas devigaj, partoprenas en ili multaj geknaboj. Aktuale — 25 gelnan-



Esperanto, en la unua fazo instruistoj de fremdaj lingvoj, personoj kiuj jam lernis Esperanton, skoltistoj, sportistoj, anoj de societoj, nu kaj al oficiistoj. La projekto intencas oferi la lernadan ankaŭ al la katolika medio.

Do la esperantistoj forveturis el Góra kun espero, des pli granda, ke ilian rondon promesis pligrandigi urbestro Walter, deklarante sian partoprenon en la kurso ankoraŭ ĉi jare.

**Andrzej Szczudło, Wschowa**  
tradukis: **Andrzej Kiszkiel**

toj de la 1a klaso kaj 16 gelnantoj el la aliaj klasoj de nia lernejo.

Ni kreis la lernejan Esperanto-Rondon „Verda Arbetoj”. Dum renkontiĝoj ni lernas Esperanton kaj tra la internacia lingvo ni ekkonas kulturojn de la diversaj nacioj en la tuta mondo.

La lingvaj okupoj, en kiuj partoprenas geinfanoj okazas 2 horojn semajne. La lernado estas por geknaboj tre interesa — gelnantoj ekkonas la lingvon kantante kanzonetojn, kurante ekzotajn manĝaĵojn, skribante leterojn. Elementoj de la Esperanto-instruado estas ankaŭ enigataj en la bazan edukadon, precipe en la sportajn, artajn, teknikajn okupojn. En E-okupoj gelnantoj ne devas partopreni — sed volas lerni Esperanton la tuta klaso (25 geknaboj).

Gelnantoj komencas la ciklon de Esperanto-lernado en la 1a klaso kaj kontinuas ĝin ĝis la 3a klaso.

Nun la lernadon de ESPERANTO kontinuas gelnantoj de la 1a klaso.

Gelnantoj, kiuj jam finis trijaran bazan ciklon de la Esperanto-edukado povas kontinui la lernadon dum lingvaj renkontoj de la Esperanto-Rondo „Verda Arbetoj”.

Kelkaj gelnantoj el aliaj klasoj de nia lernejo komencis ankaŭ la lernadon de Esperanto.

Geknaboj plibonigas la lingvokanon partoprenante en diversaj agadoj:

— kantas kanzonojn el la tuta mondo, tradukitajn en Esperanto, ekkonante samtempe kulturon de la multaj nacioj,

— faras originalajn artajn verkojn, priskribante siajn agadojn en la fremda lingvo,

— partoprenas diversajn amuzojn, ludojn el multaj landoj de Eŭropo kaj eĉ de la tuta mondo,

— preparas manĝaĵojn laŭ receptoj ricevitaj de korespondgeamikoj — en lingvo Esperanto (ekz. el Francio, Brazilio, Germanio),

— korespondadas Esperante kun gelernantoj el Hungario, Brazilio, Francio, (ekz. el la franca urbo Noyant)

— faras temajn murajn „revuetojn” en la fremda lingvo,

— preparas aranĝojn por gepatroj, aliaj gelernantoj de la klasoj I–III, en kiuj ili prezentas siajn lingvajn kapablojn,

— aranĝis lerneajn ekspoziciojn, kiu montris al ĉiuj vizitintaj la historion, eblecojn de la lingvo. Oni povis pririgardi ekz. librojn, revuojn, filmojn, vortarojn kaj aliajn esperantaĵojn. (ekz. okaze de la t.n. „Tago de la Fremdaj Lingvoj”),

— partoprenas en renkontiĝoj de esperantistoj en urbo Bielsko–Biała, kie prezentas artajn programojn kaj ekligas kontaktojn, amikecojn, praktike uzante la lingvon por komunika-

do,

— partoprenas en lingvaj konkursoj, kiujn organizas la franca revuo ICEM (ili ricevis librajn premiojn).

Mi esperas, ke la kono de Espe-

ranto ne nur plifaciligos en estonteco la lernadon de la aliaj fremdaj lingvoj sed ankaŭ ekvekos la scivolon pri la kulturo de la diversaj nacioj kaj preparos junajn homojn por la malfacila vivo en la unuiĝinta Eŭropo.

### **Jen nia ŝatata ludo:**

Ĉiu infano elektas ian nomon — (kiam ni lernas pri bestoj, ili elektas la nomon de ia besto kaj ian adjektivon — ajnan). Ili skribas la nomon sur la folieto kaj algluas ĝin sur la bruston. Poste unu el ili diras: „Gaja katino salutas la brunan urson” kaj aldonas ian movon. „Bruna urso” devas rapide respondi — ekz. „Nigra urso salutas la longan serpenton”. Kiu ne sufiĉe rapide respondos — ricevos nigran punkton. La ludon oni povas laŭvole ŝanĝi — ekz. nomoj de la fruktoj, floroj, ktp.

**Teresa Konsek**



## **Internacia Junulara Kongreso — Zakopane**

Someraj ferioj baldaŭas! Se vi ankoraŭ nenion planas por la unua semajno de aŭgusto, nepre aliĝu al la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos ekde 31a de julio ĝis 7a de aŭgusto 2005 en Zakopane. Pri la planoj por la plej grava junulara renkontiĝo dum la jaro rakontas **Anna Bichta** — LKK-anino, kiu respondecas pri informado.

### ***Kion valoras scii pri la nunjara kongresurbo?***

Zakopane — loko tre populara ĉe turistoj — troviĝas sude de Pollando, en Tatry—montaro. Ploj, certe prave, nomas ĝin „la vintra ĉefurbo de Pollando”. Sportemuloj povas tie skii, sledi, neĝtabuli. Tamen la organizantoj de IJK diras pli: „Zakopane: vintra ĉefurbo de Pollando — some-ra ĉefurbo de Esperanto”.

La plej grava kaŭzo por elekti Zakopane estis tiu, ke ĝi apartenas al la plej belaj urboj de Pollando. Ni volas, ke niaj gastoj povu iom sperti la lokan kulturon, ekzemple rigardi montaran arkitekturon aŭ gustumi tradician ŝafan fromaĝon oscypek. Krome Zakopane havas tre oportunan situon, ĝi troviĝas en la centro de Eŭropo, same proksima al esperantistoj el oriento kaj okcidento.

Oportuna estas ankaŭ la dato! Kiu volas pasigi la tutan feriadon kun Esperanto, tiu havas nekredoblan ŝancon — oni povas unue partopreni UK en Vilno, poste veturi al Zakopane kaj finfine viziti IJS en Hungario. Tio estas absolute unika ŝanco, des pli ke ankaŭ interloka vojaĝado estas facila!

Finfine gravas, ke en Zakopane tu-te ne estas kuloj...

### ***Kio estas la nunjara kongres-temo?***

La temo de nia kongreso estas „Unueco en diverseco”. Ni volas diskuti la plej gravajn aspektojn de egalrajteco — ni interparolos pri lingvoj, minoritatoj, handikapuloj, religioj... Ne ĉiuj planoj ankoraŭ certas, sed niaj ideoj estas jenaj: Ni jam scias tutcer-

te, ke lunde estos la tago de minoritatoj kaj samtempe tago de Pollando. Ni organizos prelegojn, kursojn, interkonajn okupojn, ekskurson tra la urbo kaj koncertojn de loka folkloro muzikgrupo kaj pola rok-muzika grupo „Hotel Zacisze” (ili ne estas esperantistoj, sed ni volas, ke ili kantu Esperante. Eble ni sukcesos!) Martede estos la lingva tago. De mateno ĝis vespero okazos multaj prezentoj, pri kiuj ni baldaŭ detale skribos en nia ttt-ejo ([www.tejo.org/ijk](http://www.tejo.org/ijk)). Vespere speciale por ni koncertos muzikgrupo „Esperanto Desperado”. Merkrede okazos tuttagaj ekskursoj. Ĵaŭde ni prezentiĝos al loĝantoj kaj turistoj en Zakopane — en la urba parko okazos Lingva Festivalo kaj koncerto de bonkonata franca kanzonisto JoMo. Poste verŝajne okazos ankaŭ koncerto de iom ekstremera Esperanta rokmuzika grupo el Pollando „Krio de Morto”. Ni planas ankaŭ elekti „la reĝinon de Esperantujo”. Vendredo estos la tago de religioj kaj teatraj spektakloj. Sabate temos pri handikapuloj kaj estos la tempo konkludi nian pripensadon pri „Unueco en diverseco”.

### ***Vi menciis tuttagajn ekskursojn. Kion oni povos viziti?***

Ĉiu havos kelkajn eblojn. Ni organizos ekskurson al Auschwitz Birkenau — dum milita hitlera koncentrejo, kie oni ekstermis pli ol unu milionon da homoj. Alternative oni povos viziti la salminejon en Wieliczka (Vjeliĉka), kien ekskursis ankaŭ Zamenhof dum UK 1912 en Krakovo. Dum reveno el la salminejo okazos vizitado de Krakovo, iama ĉefurbo de Pollando.

Krome por naturŝatantoj ni planas organizi ekskurson al la Nacia Parko de Tatrý-montaro.

**Oni povos partopreni ankaŭ diversajn seminariojn, kursojn kaj aliajn allogajn okupojn...**

Jes, okazos la seminario „Flugiloj” por junaj instruistoj de Esperanto kaj ankaŭ „E@I” — seminario pri popularigado de Esperanto en la Interreto. Ni planas kursojn pri la pola lingvo, gestlingvo, pentrado sur vitro kaj taiĉio. Ĉiuvespere funkcios kongresaj kafejoj kaj oni povos rigardi filmojn en E-kinejo. Mi rekomendas al ĉiuj promenojn al Nacia Parko de Tatrý-montaro (kaj la matenan gimnastikon). Ĉiu devus trovi programe-rojn interesajn por si. Kaj evidente dum la kongreso oni povos interparoli en unu komuna lingvo.

**Kiel statas la preparoj al IJK en Pollando?**

Dank’ al la urbestro de Zakopane ĉiuj preparoj progresas laŭrite. Nun ni prilaboras programajn detalojn. Se iu havas ankoraŭ interesan ideon ligitan kun la temo kaj volas gvidi iun programeron, ni kore invitas! Por ĉiuj kontribuantoj estos rabatoj. Mi ankoraŭfoje rekomendas viziti la ttt-ejon [www.tejo.org/ijk](http://www.tejo.org/ijk). Ĝuste tie oni povas aliĝi kaj kreskigi la jam 260-opan grupon da partoprenantoj.

La alta protektanto de IJK konsentis esti la prezidento de Pollando, Aleksander Kwaŝniewski, kiu plenumis jam ĉi tiun funkcion dum IJK 1986, tiam kiel ministro pri jurnularo. Nun ni serĉas amikajn amas-komunikilojn, kiuj volos patroni al la

kongreso.

Ni kore invitas ĉiujn esperantistojn el la tuta mondo — venu al Zakopane inter 31a de julio kaj 7a de aŭgusto 2005. Ni kune amuziĝu — espereble ankaŭ Esperanto iom profitos el tio!



## La 5a Printempa Renkontiĝo de esperantistoj en Pelplin

Nome de Kocjovia Filio de PEA mi informas ĉiujn, ke okaze de nia jubileo — „La 20-jara Esperanto-movado en Pelplin” nia kvina renkontiĝo titolita „Esperanto kantante” okazos la 21–22an de majo 2005.

Se iu volus partopreni kaj ankaŭ konkuri en festo de Esperanta kanto (premioj por ĉiuj partoprenantoj en la konkurso garantitaj) bonvolu sendi vian aliĝilon al la adreso: Kocjovia Filio de PEA, 83–130 Pelplin, ul. Sambora 5 (ZS NR 1), aŭ telefone: 0 604 156 838, aŭ (58) 536–15–57, aŭ retpoŝte: [jagaw53@poczta.onet.pl](mailto:jagaw53@poczta.onet.pl).

**Jadwiga Wasiuk**



Karaj Gesamideanoj, Geamikoj, Gesinjoroj, karaj Fratoj en Kristo!

En la revuo „Niedziela” por Pasko aperis inter alie informoj pri la ŝangoj en Episkoparo kaj oni informas, ke la nova animzorganto de polaj esperantistoj estos pastro Roman Gmyrek.

Elkore mi ĉiujn salutas kaj deziras benon por ĉiu tago de Resurektinta Sinjoro Jesuo Kristo

**Bogusław Sobol**

## Internacia konkurso

Al ĉiuj kunlaboremaj samideanoj tra la tuta mondo!

Kun varma peto pri diskonigado en via Lando, ekster Via Lando, ĉie tra la tuta mondo!!! Dankon!

TRIESTA ESPERANTO–ASOCIO, enkadre de vasta aranĝo realigota en la venonta decembra monato ĉijara, kies temo estas „KRIPO, hodiaŭ kaj hodiaŭ” kaj kiu antaŭvidas ekspozicion kaj prelegojn pri kripoj, starigas konkurson por geknaboj — aĝo inter 6 kaj 14 jaroj.

Ni petas vin, diskonigi ĝin kiel eble plej multe inter lernejoj, nevoj, nepoj, ktp, ne gravas ke la partoprenontoj estu bonaj konantoj de Esperanto..., vi ja povos ilin helpi, ĉu ne?

Plej koran dankon por via kunlaboro kaj multajn salutojn

**Elda Doerfler**  
**Triesta Esperanto–Asocio**  
**testudo@adriacom.it**

## MIA KRIPO

Povas partopreni geknaboj kun aĝo de 6 al 14 jaroj el la tuta mondo, al kiuj ni petas sendi — ĝis la 15a de oktobro 2005 — al tiu ĉi adreso:

ESPERANTO TRIESTE — C.P.  
601–34100 TRIESTE CENTRO — ITALIA

unu aŭ pli da faritaĵoj pri la supre indikita temo, en la sekvaj formoj:

- fotografaĵo (ekz. de hejma aŭ lerneja, aŭ de preĝeja kripo) en la grandeco maksimume de A4–for-

mata folio;

- desegnaĵo (ekz.: kiel mi vidas hodiaŭ la kripjon, kiel mi ŝatus ĝin...) — teksto, skribita sur maksimume unu A4–formata folio (ekz.: malgranda rakonto pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo...)

- manfaritaĵo (gipse, ligne, metale, papere, ktp. ktp.).

La teksto estu en la internacia lingvo Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en la samaj lingvoj. Krome estu ankaŭ persona kaj familiaj nomoj, malgranda foto, aĝo, lernejo kaj klaso, poŝta adreso.

Ĉiuj faritaĵoj prezentigos al publiko dum la kristnaska periodo 2005.

Oni premios la plej trafajn faritaĵojn, laŭ speco kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj, de 9 ĝis 11 kaj de 12 ĝis 14) okaze de publika ceremonio en Trieste.

Korajn dankojn pro Via preteco kunlabori! Plej amike via

**Elda Doerfler**  
**testudo@adriacom.it**



## Nova PIV baldaŭ denove havebla

La Nova Plena Ilustrita Vortaro estas en la presejo kaj baldaŭ denove estos havebla. La prezo ĉe SAT kaj FEL estos 80 eŭroj + afranko.

fonto: „Ret-Info”